

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2024

Jarkolekto 11 - Numero 4



Bohumil Kratky ĈS, 1984
Wim de Bruijn NL, kolektanto-publicisto
Romio, denaro de Julius Caesar, ĉ. 50 a.K.

ENHAVOTABELO

de oktobro 2024

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Plaketo por internacia esperanto-kursejo, Bulgario</i>	
<i>XXI^a Universala Kongreso de Esperanto, Budapeŝto 1929</i>	
<i>21a SAT- kongreso Amsterdamo 1948</i>	
<i>Frigyes Karinthy (1887-1938)</i>	
Por spuremuloj: Enigma germana esperanta (?) ordeno	10
Spikumajoj & suplementoj: Jozefo Horvath / Esperanto en uniformo .	11
Aspektoj de numismatiko: Viziti akuŝoĉambrojn de artaj medaloj!	13
Historiaj aspektoj: Numismatikaj atestaĵoj de la unuaj (?) denaskaj esperantistoj	15
Medalistoj: 36. Béni Ferenczy (1890-1967)	17
Terminaro: Alfabeto listo (39)	18
Valormarkoj & valorbiletoj: 46a UK de Esperanto / Arta Festivalo Harrogate	19
1912 Poŝtrepago al la fama kuracisto d-ro D'Or	
Numismatika forumo: Eŭropa Centra Banko aspiras lanĉi ciferecan eŭron	20
El la gazetaro: La patro de "eŭro" estas esperantisto	22
Retpoŝto	23
Anoncoj & eventoj	36

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*Ne deziru al viaj heredontoj...
grandan monon en la venonta jaro!
("Zamenhofa Proverbaro")*

Post trimonata "intermezo", karaj membroj kaj aliaj legantoj, necesa kaj fruktodona i.a. por kunigi materialojn prinumismatikajn kaj samspecajn novaĵojn el Esperantujo, via redakcio denove havigos al vi kelkajn vidindaĵojn kaj legindaĵojn en ĉi vintra numero de 2024.

Kion ni elektispor vi, ni prezentos poste, sed unuavice ni bezonas iom da tempo por kelkaj praktikaj mesaĝoj kaj petoj. Tro ofte ni konstatas, ke ekzempleroj de iu nova numero rapide retrovenas, ĉar la mesaĝujo de la koncerna membro estas jam... tute plena! Tio por ni estas bedaŭrinda konstato, kaj tial ni do petas al vi ĉiuj rezervi sufiĉe da spaco dum la lastaj semajnoj de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Eventuale vi povas tamen daŭre trovi mankantajn numerojn (*ĝis la unua de la 1a jarkolekto!*) tiamaniere: *Google* > ena.frali.bplaced.net.


Dua peto koncernas la kontaktojn inter vi kaj la redakcio. Ni tute ne rajtas plendi pri reagoj, konversacioj kaj kontribuajtoj por la revuo de legantoj kaj aliaj samideanoj pere de la rubriko "Retpoŝto", eĉ male. Sed, ekzemple la rubriko "Numismatika forumo" tre ofte publikigas artikolojn de eksteruloj kun ideoj kaj vidpunktoj, kiuj meritas reagojn de vi, kaj eĉ korektojn. Do kiel en la antikvaj, grekaj agoroj, kie diskutoj, eĉ sur la ŝtuparo, spicis la spiriton de la vivanta demokratio: **reagu!** Eĉ mallongaj kritikoj kun argumentoj estos ege bonvenaj ĉe ENA kaj tio koncernas ankaŭ ĉiujn aliajn rubrikojn. Antaŭdankon!

Rilate al la artikoloj de ĉiu nova numero, ni ripetas, ke nia celo (r)estas krei sufiĉe grandan diversecon por plaĉi al plejble diversaj legantoj. Se iu el ili tamen ŝatus proponi novajn aŭ alitipajn temojn, ni certe tuj streĉus la pintojn de la oreloj! Nia revuo (r)estu la revuo de la legantoj, de ili jes aŭ ne ŝatata, se eble de ili nutrata per kunlaboro aŭ akcepto kaj tial de ili rekomendata kaj disvastigata en Esperantujo kaj aliloke.

Finfine nur restas al ni la tasko deziri al vi ĉiuj agrablan, stimulan kaj eĉ distran legadon...

Kiel vi ja scias, nur je la fino de januaro aperos la unua numero de nova jarkolekto, do tial ni jam nun deziras ĉion bonan en la jaro 2025 al vi kaj viaj gekaruloj !!!

Bert



*Pacon por Vi
kaj
por la Mondo!*

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Plaketo por internacia esperanto-kursejo en Pisanica, Bulgario



Lando: Bulgario

Metalo: latuno

Mezuroj:

malfermite: 97 x 153 mm

fermite: 97 x 80 mm

Jaro: 80aj jaroj de la 20a jarcento

Kvanto: 10 (!)

Pezo: 657 g

Diko:

8 mm

13 mm

Medalisto: Bogomil Ĵivkov

Averso:

malfermite: surskriboj en la medalo per reliefaj literoj:



Maldekstre:

INTERNACIA
ESPERANTO
KURSEJO
V.PISANICA
DISTRIKTO
SMOLJAN
BULGARIO

dekstre:

NI SEMAS
KAJ SEMAS
NENIAM LACIĜAS
PRI L'TEMPOJ
ESTONTAJ
PENSANTE
L.L.ZAMENHOF

Reverso:

fermite: modlita per ornamaĵoj kaj kvinpinta stelo kun gravurita litero E.

Rimarko 1:

la plaketo havas formon de libreto, konsistanta el du moveblaj partoj, ligitaj per ĉarniro.



Rimarko 2:

la arta medalo estis kreita de Bogomil Ĵivkov ĉirkaŭ la 80aj jaroj de la 20a jarcento laŭ propono de s-ro Angel Todorov, membro de BEA, ĝenerala direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj estrarano de la asocio Monda Turismo.

Tipo E1 - Ordenaspektaj medaloj

XXI^a Universala Kongreso de Esperanto, Budapeŝto 1929



Lando: Hungario

Kvanto: *serĉata*

Metalo: *serĉata* (orkolora)

Pezo: *serĉata*

Mezuroj: 3,81 x 3,81 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1929

Diko: *serĉata*

Averso:

supre: kvadrata, rondigita plaketo kun fondo por fiksi(verdan) rubandeton. Pentrita nigra linio limdifinas la bordojn de la surfaco, krom en la dekstra kaj maldekstra supraj anguloj, kie fasketoj de spikoj interrompas la kvadratan linion.

meze: la fono montras grandegan konstruaĵon ĉe la rivero Danubo. Sur la antaŭa plano pozas virino en tradicia vesto. En la brakoj ŝi tenas florojn, kiuj parte kvazaŭ tuŝas la fonon. Super la kupolo de la konstruaĵo troviĝas granda verda stelo.

Tute sube: “XXI^a KONGRESO DE ESPERANTO ~ BUDAPEST ~ 1929”

Reverso:

Surfaco pentrita tute nigre



Rimarko 1:

la konstruaĵo estas la domo de la Hungara Parlamento en Budapeŝto.

Rimarko 2:

la ĉi montrata ekzemplero troviĝas en la usona Holokaŭsta Rememoriga Muzea Kolekto en Vaŝingtono. Ĝin iam posedis slovaka juda rifuĝinto Tom Kovary. Liaj infanoj Myra kaj Vally donacis ĝin kaj multajn aliajn privatajn objektojn de la iama familio de rifuĝintoj al la muzeo.

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

21a SAT-kongreso Amsterdamo 1948



Lando: Nederlando

Kvanto: *serĉata*

Metalo: latuno

Pezo: 5,10 g

Diametro: 30 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1948

Diko: 0,50 mm

Averso:

ĉirkaŭe: “21^ASAT KONGRESO AMSTERDAM”

meze: 19 48



tutmeze: blazono de la urbo Amsterdamo



Reverso:

fibolo, aldone fiksita per plumbo por faciligi la uzon kiel insigno

Rimarko 1:

la meza esperanto-stelo de la latuna medalo montras malbrilan, la aliaj partoj brilan surfacon

Rimarko 2:

SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda (*vidu: Vikipedio*)



Frigyes Karinthy estis eminenta hungara poeto, dramaturgo, ĵurnalisto, (sciencfikcia) verkisto, tradukisto kaj “ESPERANTISTO”.

Li verkis poemojn, eseojn, teatraĵojn, novelojn kaj romanojn (pluraj esperantigitaj) kun humura/satira enhavo.

Krome li kreis spritajn, altvalorajn kontribuojn en la hungara pri esperanto, eĉ estis prezidanto de Hungara Esperanto-Societo de 1932 ĝis 1938 kaj partoprenis en kelkaj esperanto-kongresoj, KVANKAM LI NEK LERNIS, NEK PAROLIS ESPERANTON!

El lia verkaro naŭ famaj verkoj estis eĉ filmigitaj.

Ekde la Unua Mondmilito Karinthy verkis parodiojn kontraŭ la popola, nacia movado en Hungario. Li estis realeca humanisto kaj kontraŭulo de naciismo kaj milito. Li defendis la burĝan revolucion, sed kontraŭstaris la t.n. *diktaturon de la proletaro*. Karinthy estis unu el la unuaj intelektuloj kiuj kritikis diktatorojn kiel Hitlero, Musolino kaj Stalino.

Kelkaj el la esperantigitaj verkoj de Karinthy Frigyes



Unu el la esperantigitaj verkoj de la aŭtoro.



Elhungarigis: Jozefo Horvath, Budapeŝto 2022

Fontoj: diversaj numeroj de “Literaturo Foiro” kaj Google

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al esperanto

Karinthy Frigyes (1887 – 1938)



Lando: Hungario
Metalo: bronzo
Diametro: 95 mm
Jaro: 1939

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 400 g
Medalisto: Ferenczy Béni
Diko: *serĉata*

Averso:

supre: surskriboj en la hungara:

“EMELJETEK
FEL (,) SZÓLNI (,) LÁTNI (,)
ÉLNI (,) ITTLENT A
PORBAN NEM TVDOK
BESZÉLNI”

sube kaj dekstren: parto de busto de Karinthy

tute sube, meze: FB = Ferenczy Béni

39 = 1939

Reverso:

persono kun ŝultra mantelo, bastono kaj burleskula ĉapo

maldekstre kaj dekstre, dividite, latina surskribo: “ECCE POETA”

Rimarko:

elhungare > “levu min, por diri, vidi, vivi,
ĉi tie en la polvo mi ne povas paroli”

ellatine: > “Jen poeto”

Multan dankon al nia membro Marc Vanden Bempt, kiu elhungarigis la surskribojn.

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ (preskaŭ) nenion.

Enigma germana esperanta (?) ordeno



Laŭ itala vendisto la objekto estus germana, esperanta ordeno. Laŭ ni dubinde pro la koloro de la steleto ... Krome, kion signifas IDES? Informu nin!

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ



Jozefo Horvath (°1949)



S-ro Horvath, por la ENA-revuo *unuavicenemalhavebla provleganto ekde 2016(!)*, estas hungara esperantisto, kiu profesie instruis en mezlernejo kaj okupiĝadas i.a. kiel vortaristo kaj tradukisto. Inter 1970 kaj 1975 li studis germanan kaj rusan filologiojn kaj en la epoko 1983-85 en Universitato ELTE, Budapeŝto, interlingvistikon kaj esperantologion. La tuta familio, kun edzino kaj du infanoj, praktikas denaskismon, do frato kaj fratino estis dekomence edukataj kaj en esperanto kaj en la hungara! Multajn aliajn aspektojn kaj informojn pri Jozefo Horvath vi povas trovi ĉe Google, Vikipedio.

Vidu ankaŭ por la priskribo de la medalo: jarkolekto 2, numero 4, p.6

Esperanto en uniformo



Esperantistoj-tramistoj en Dreseno en 1948

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Viziti akuŝoĉambrojn de artaj medaloj!



“En Grobbendonk, en la belga provinco Antverpeno la numismatika asocio “Promotie van de Medaille” (= promocio de la medalo) jam diversfoje vizitis la firmaon “Mauquoy” [mokva], fondita de Paul Mauquoy (PM). En Belgio ĝi estas ekde 1875 unu el la plej grandaj kaj famaj fabrikantoj de medaloj, memormedaloj, ordenoj ktp. Tiu firmao ĉiun jaron kreas por la membroj de “Promotie van de Medaille” memoran jarmedalon, donacatan al ĉiuj membroj.

Tial mi volas raporti pri grupa vizito, organizita de “Promocio de la Medalo”, por observi la procezon de la medalfarado. Tiuokaze temis ne unuavice pri la inspiro kaj la entuziasmo de artistoj-medalisto, sed pri la koncentriĝo kaj la sindediĉo de metiistoj. Ni do ne parolos pri la flankenmeto de linio je dekono da milimetro, la forpreno de duona gramo da vakso por rafini la bildon, sed pri maŝinoj, kiuj per forto de miloj da kilogramoj efike transformas latunajn platojn. Do per aparatoj, kiuj tranĉas metalon kiel buteron, dum vi kaj ni permane eĉ ne sukcesus skrapi la surfacon per la plej akra ilo. Tamen, ĉiu ekspoziciata medalo montras la saman rafinon kiel la skizita modelo de la artisto. Jen la celo kaj la kapableco metiistaj: senĉese egali la postulon kaj la perfektecon de la kreinto.

Imagu nun, ke vi pasumas laŭlonge de imponaj vitroŝrankoj; tra koridoreto vi atingas sekve la fabrikejon...

La starto de la fabrikado estas la havigo, far la artisto, de bareliefo kun profilo je ĉirkaŭ 30 centimetroj. Tia profilo povas esti vaksa, argila, gipsa aŭ surbaze de alia modla materialo. Sur tiu reliefo estas fandata araldito, hardita artefarita fibro, tiel ke la rezulto estas samgranda kontraŭformujo. Sekve ĝi estas metata en reduktmaŝinon, kiu transmetas la reduktitan bildon sur ŝtalan cilindron.



Ripete, sed per senĉese pli maldikaj stiftoj, la (negativa) bildo estas fiksata kun diametro laŭ la deziro de la kliento. La aktualaj medaloj por la “Promocio” havas diametron de sep centimetroj, do sufiĉe reduktita mezuro. La granda avantaĝo de tia tekniko estas, ke la detaloj estas multe pli delikataj; por la artisto estas pli facile tranĉi aŭ modli la pli taŭgajn formojn. La nomo de la ŝtala cilindro, 11 centimetrojn meznombro kaj 5,5 centimetrojn dike estas “matrico”. Tiel do medaloj estas stampataj, almenaŭ laŭ la klasika metodo.



*Kunlaboranto en nia epoko tamensidas ĉe komputilo kaj kvazaŭ senatente, transformas platon 2D-an en 3D-an desegnaĵon kaj dume, per simpla musalklako, li plibonigas je milimetroj la konturojn, kiel klasika instruita artisto faris **permirette**, bantoforma modlilo, por forigi superfluan argilon permane.*

Tamen la kreado de medalo estas ege preciza procezo, laŭ komputila teknikisto “speco de modlado per la komputilo”. Tiu laborado povas daŭri kelkajn tagojn. Ankaŭ la komputila modelo sekve estas gravurata en ŝtalan cilindron.

*Ni tamen ne jam estas pretaj, por stampi la medalon! Kiam la ŝtalo estas sufiĉe mola por uzi gravuran stifton, ĝi povus simple esti fuŝformata pro la enorma forto de la premilo. Tial, la matrico devas esti hardata. Enfermita en karbono, ĝi estas varmigata, ĝis la kerno estas ruĝarda kaj subite trempata en hardoleo ĝis la nivelo de ĉambrotemperaturo. Tiu procezo hardas la ŝtalon je tre alta koeficiento. Tamen la ŝtalo iĝas krome ege rompebla. Tial oni devas ĝin denove varmigi, sed ĉi-foje nur ĝis ĉirkaŭ 200 celsiaj gradoj. Sekve ĝi ricevas sufiĉe da tempo, por malplivarmiĝi. Tiel la ŝtalo perdas la rompeblecon kaj restas hardita. Tiamaniere eblas stampi medalon post medalo. Post kiam la matrico estas purigita, ĝi estas portata al la premilo. Ege singarde, ĉar pro la diversaj procezoj ĝi dume iĝis **altpreza valorajo**.*

Post la enmetado de la matrico en la premilon, sur ĝin estas metata metala ronddisketo. Depende de la profundo de la reliefo la premilo ĉirkaŭ kvinfoje stampadas la diskon sur la matricon. Pro la premada forto je 1 200 000 da kilogramoj la disketo transformiĝas laŭ la bildo de la matrico, kaj tiel nova medalo estas stampata. Plusa metalo estas premata eksteren kaj ricevas la formon de ringo, kiu poste estos fortranĉata.

Post la forigo de la medalo el la ringo la pli grava procezo estas kompleta. Jen la medalo, kiu finfine povos esti enmanigata ... Averse, per lasera printilo, la emblemo de “Promotie van de Medaille” estas aldonata, poste la eldonkvanto kaj la laŭorda numero. (En vitroŝranko ni komence de la gvidado jam estis rimarkintaj ege ŝatatan kaj deziratan ekzempleron de la jarmedalo kun laŭorda numero 001!) La medaloj por la membroj fine estas polurataj kaj farbataj per ŝprucigiloj kaj finfine ankoraŭ patinataj kaj vernisataj.

Jen do raporto pri la naskiĝo de artaj medaloj. Restos senĉese senlimaj admiro kaj respekto por la metiistoj, kiuj i.a. frezas latunajn platojn, lutas pintetojn per gazflametoj, tiel maldikaj kiel la pinto de kraĵono!”

Verkis: Jack Visker

Esperantigis: Bert



Du el multaj pormembraĵaj jarmedaloj faritaj de Mauquoy por “Promotie van de Medaille”

Fontoj: -medal@mauquoy.com

-*Jack Visker: “Op bezoek bij Mauquoy - De kraamkamer van onze medailles”*El: “Flash medailles”

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Numismatikaj atestaĵoj de la unuaj (?) denaskaj esperantistoj



La duan de septembro 1939, nur unu tagon post la malkuraĝa hitlera invado en Pollando, du slovakaj simpatiuloj de iu loka kaj obskura nazia grupo atakis Tibor kaj Ernő Kóvári surstrate en ilia hejma urbo Bratislavo, ofendante ilin pro ilia juda deveno.

La malpli juna filino de Ernő, Myra Kóvári longtempe poste rakontis, ke ŝia patro deklaris al ŝi esti vidinta la tiamajn fiulojn, turmentantajn najbaron tiel kruele, ke li timis, ke la fiuloj vere intencis mortigi lin. Kiam la atakantoj rimarkis Ernő, ili laŭte ekkriis. Tibor akompanis sian fraton kaj ambaŭ tuj rekonis, ke la situacio estas ege danĝera. Kion la du nazioj ne sciis, estis ke ili estos preskaŭ sendefendaj kontraŭ la du fratoj. Ambaŭ estis eksterordinaraj atletoj de la Bar Kochba Juda Sporta Klubo, naciaj ĉampionoj pri atletismo, du el la unuaj batalantoj, trejnataj de Imre Lichtenfeld, la kreinto de Krav Maga, stilo de efika permana batalporto, eĉ nun ankoraŭ uzata en la israela armeo... La du atakintoj post nelonge urĝe bezonis kuracistan helpon en la urba malsanulejo!

La du fratoj krome estis eminentaj lingvistoj. En Esperantujo ili estas konsiderataj kiel la unuaj du denaskaj esperantistoj en la historio, kiuj flue parolis esperanton, ĉar la gepatroj parolis esperanton kaj instruis al la infanoj esperanton hejme. Ili krome uzis la germanan, la hungaran kaj la slovakon. Ambaŭ vizitis germanan lernejon, studis la anglan kaj la francan kaj krome lernis la hebrean! Ili do estis atletaj poliglotoj... sed nur judoj, laŭ la du “kuraĝuloj”.

Pro la surstrata batalado ili estis tamen arestitaj, kune kun la propra patro... En la malliberejo ili sukcesis komuniki, laŭte parolante esperanton. Bratislavo tiam estis politike ligita al la nazia Germanio. Post la arestado, la vendejo de la Kóvári-familio estis tute prirabita. Tamen, distrikta oficisto, kiu ankaŭ estis la direktoro de la malliberejo, helpis ilin kaŝloĝi kaj la Juda Centra Komitato kontraŭleĝe subtenis ilin kaj helpis ilin eskapi al Hungario, poste tra Italio kaj per ŝipo al Novjorko, la 29an de februaro 1940. En la nova patrujo ili ŝanĝis la familian nomon al Kovary; Tibor iĝis Tom kaj Ernő ricevis la nomon Ernest.

La pli juna filino de Tom, Vally, rakontis poste, ke ŝia patro ekde 1943 servis kiel militisto en la usona armeo kaj ricevis sekretan instruadon kaj sekve laboris kiel oficisto de la Sekreta Servo i.a. por senmaskigi naziojn kaj tiajn simpatiulojn en Usono. Nur al Vally li hazarde foje rakontis pri sia sekreta tasko en la armeo.

Ankaŭ Ernest estis volontulo-militisto kaj dum la milito la du fratoj korespondis unu kun la alia kaj ambaŭ kun la gepatroj en esperanto surbaze de ne malpli ol 750 leteroj! Post la normandia surbordiĝo de la aliancanoj ili estis tamen registare admonitaj korespondi anglalingve anstataŭ esperantolingve! Ernest eĉ partoprenis en la usona atako en Normandio, la 6an de junio 1944, kiel helpanto de juda soldatpastro, tiel ke li korpe kaj mense spertis la teruran kruelecon de la milito.

Ernest krome tradukis por la Departemento de Justico diversaĵojn kiel preparado de la disfamaj procesoj en Nurenbergo (Germanio) post la milito kontraŭ germanaj militaj krimuloj. Dum la milito li jam sciis, ke ekzistas en Eŭropo pli ol cent koncentrejoj por ekstermi judojn kaj aliulan malsuperan “herbaĉon”. Post la venko li serĉis surloke elsaviĝintojn de la propra juda familio. Tiel li iĝis ankaŭ tiurilate fakulo, kiu helpis postvivantojn de la holokaŭsto ĝis sia morto en 2013.

Myra ankaŭ rakontis, ke ŝiaj gepatroj havis multajn geamikojn, sed ke ili rifuzis diri, kiel ili iĝis geamikoj. Ĉiu el ili pri tio tute silentis. Jen klarigo de la senfinaj timo kaj malfido de popolo, jam multajn jarcentojn senĉese ĉaspelata kaj humiligata. Parte klarigo de la jam pasintaj kaj aktualaj kruelaj katastrofoj en la Mezoriento ekde 1948... kaj eĉ multe pli frue...

En 1953 la familio de Tom transloĝiĝis al Novjorko. Ses jarojn poste li iĝis profesoro pri la hispana kaj pri lingvistiko en Kortlando, sekcio de la Universitato de Novjorko. Li emeritiĝis en 1985, sed restis aktiva membro de diversaj judaj asocioj. Li serĉis spontane kontakton kun nekonatuloj, eĉ eksterlande, kiam li supozis esti aŭdanta iun paroli esperanton! Krome, li konis multajn amikojn tutmonde, sed neniam li klarigis kie aŭ kiel li unue konatiĝis kun ili.

En la kolekto de la “United States Holocaust Memorial Museum” en Vaŝingtono troviĝas ne nur la plaketo priskribita en ĉi numero (rubriko “Moneroj & Medaloj”), sed ankaŭ insigno ovala kun bildo de militisto sur verda stelo, eldonita okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en 1924 en Vieno, memoraĵoj el la antaŭ-usona epoko de la familio en Slovakio.



M E D A L I S T O J

36. Béni Ferenczy (1890 – 1967)



Ferenczy estis hungara skulptisto, grafikisto kaj **medalisto**.

Li naskiĝis en 1890 en Szentendre (urbo en la regiono Pest) kaj li mortis en 1967 en la hungara ĉefurbo.

Ambaŭ gepatroj estis artistoj-pentristoj kaj Béni lernis la pentradon en la artista komunumo de Nagybánya. Poste, li kompletigis la artan edukadon en Munkeno (Germanio) kaj Parizo (Francio).

En 1919 li aktivadis kun la komunistoj kaj poste devis migri en diversajn eŭropajn urbojn.

Inter 1945 kaj 1950, denove en la naskiĝlando, li instruis en La Akademio de Belaj Artoj. En 1948 kaj 1965 li ricevis la premion Kossuth. Laŭdire li estis ankaŭ framasono.

En la kvindekaj jaroj li sin dediĉis ankaŭ al la ilustrado de libroj. Kiel grafikisto li estis unu el la plej gravaj hungaraj desegnistoj kaj ilustristoj.

Krome li kreis diversajn statuojn kaj monumentojn en stilo monumentega, laŭ la tradicio de la arkaikaj grekaj skulptistoj.

Ankaŭ lia talento kiel medalisto estis eksterordinara.



Lian medalon honoran al Karinty ni priskribas en ĉi numero en la rubriko “Moneroj & Medaloj”

TERMINARO

Alfabeto listo (39)

aktivo: *la tuto de posedaĵoj (terenoj, konstruaĵoj, maŝinoj kaj aliaj inventaraĵoj), aktivaj ŝuldoj (debitoroj, kambioj enkasigotaj, partoprenoj ktp) kaj rajtoj (kiel patento ktp)*

aseto: *monerpezilo por kontroli, kiugrade oraj aŭ arĝentaj moneroj estas tro malpezaj laŭ la normoj*

bankpezilo: *tipo de monerpezilo por grandaj partioj da oraj moneroj*

blokmonerfiguro: *karakteriza detalo, averse sur monerpezilo, imitanta la normkontrolendan tipon de valida monero, do simpligita figuro sur monerpezilo, samaspekta kiel koncernaj (oraj) medaloj*

debeto: *kutime la maldekstra flanko de konto, en kiun oni enskribas aktiverojn, ekz. aktivajn ŝuldojn, sed ankaŭ elspezojn*

Internacia Mona Fonduso: *asocio (establita en 1945) de registaroj kun la celo progresigi internacian monan kunlaboron, stabiligon de valutoj kaj ekvilibranta ekspansion de la mondkomerc*

monamasigado: *okazas kiam la monposedantoj portempe eltiras parton de la monkvanto el la cirkulado, kvankam ĝi kompreneble restas parto de la statistika monkvanto, ekzemple ŝparita mono kaj saldoj en kontoj kurantaj, per kiuj oni ne faras pagojn dum longa tempo*

monerpezilo: *iama moneraspekta pezilo por normkontroli orajn kaj arĝentajn monerojn*

pezilpinĉilo: *supra ŝvelaĵo por preni (metalajn) monerpeziletojn el skatoleto*

randotranĉo: *certaj iamaj prapatraj trompuloj fortranĉis per tondiloj partetojn de oraj kaj arĝentaj monerrandoj. Ĉar estis preskaŭ neeble kapti ilin ĉe la freŝa faro, bankoj kaj monŝanĝistoj devis normkontroli kaj laŭnormigi tiajn monerojn per vektaj pesiloj*

Reĝa Monfarejo: *en Britujo (Londono) la nomo de la ŝtata monfarejo*

saldo: *la diferenco inter debeto kaj kredito*

trumpetpesilo: *tipo de iama vekta monerpesilo*

valuta kurzo: *la prezo de valuto esprimata en alia valuto*

valuto dura: *kiam la postulado de difinita valuto superas la proponadon, la kurzo de tiu valuto sendube estas relative alta. Post longa ekzistado oni nomas ĝin “dura”*

valuto mola: *kiam ĉe donita kurzo la proponado de valuto superas la postuladon dum longa tempo, kio estas simptomo de neekvilibra pagobalanco de la koncerna lando, la kurzo de tiu valuto kutime estas relative malalta*

valuto: *la monunuvo de certa lando*

vekta pesilo: *normkontrol-cela aparato kun jugeto (leviero); unuflanke pendas telereto por monerpezilo, aliflanke alia por moneroj kontrolendaj*


VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

46a. Universala Kongreso de Esperanto / Arta Festivalo Harrogate Respondkupono / valoro: 1 brita ŝilingo



1912

Poŝtrepago (en spesmiloj!) al la fama kuracisto d-ro D'Or



NUMISMATIKA FORUMO

Eŭropa Centra Banko aspiras lanĉi ciferecan eŭron...



“Libero estas la plej “sankta” principo en la principaro de la Eŭropa Unio. Ĉiuj EU-anoj tie rajtas labori, studi kaj komerci libere. En tiu procezo la eŭro ludas gravan rolon. Ĉie en la unio oni rajtas uzi la propran unuon, por aĉeti aŭ vendi varojn kaj servojn kaj ĉiuj rajtas vivi en ĉiu ajn ŝtato de la sama Unio.

Eldonante eŭrobiletojn, la Eŭropa Centra Banko (ECB) akceptas decidan respondecon por defendi kaj garantii tiun nemalhaveblan liberon. La plimulto de la eŭropanoj deziras ja esti kapabla pagi kontante; por multaj eŭropaj civitanoj tio etas esenca kondiĉo de persona libero. Kontanta mono estas facile akirebla, inkluziva kaj akceptata ĉie en Eŭropo. Krome ĝi garantias plejeble sekurigatan privatecon.

Tamen, koncerne ciferecan pagadon mankas alternativo samspeca kiel kontanta mono. Tio limigas la liberon en epoko, en kiu la bitigado senĉese kaj daŭre pli rapide kreskas.

Por pagi ciferece en vendejoj foje, sed malofte, eblas pagi per naciaj pagiloj kiel bankokartoj aŭ cifereca “monujo”. Tio bedaŭrinde ne eblas en la plimulto de la eŭropaj landoj. Krome, eĉ se tio eblas, ofte la sistemo mem ne (senmanke) funkcias, kiam aĉetantoj butikumas rete, ofte rajtigantoj aŭ rajtigitoj kun interamikaj kontoj aŭ ajnaj vojaĝantoj en la eŭropa teritorio. Tial oni ne povas ne vidi retbankumadon kaj neeŭropajn bankokartojn – kiuj ne ĉiam estas akceptataj – aŭ uzi diversajn pagorimedojn.

Por korekti tiun mankon ECB strebas al la enkonduko de diĝita eŭro. Tio estu do aldona ebleco por pagi kontante. Ĝitamen ne estu deviga; lasu la konsumantojn elekti mem! Diĝita eŭro povos esti uzata ankaŭ eksterrete, eĉ se hazarde mankus elektra fluo aŭ se la reto ne havus sufiĉe da atingopovo.

Diĝita eŭro por firmaoj estus faciliga pagilo dum tuteŭropaj negocoj. Tio ankaŭ pli fortigus la konkurencon pozicion en la merkato (kiu nuntempe estas superregata de ne-eŭropaj konkurantoj), tiel ke kostoj por komercantoj kaj por konsumantoj povus malaltiĝi.

Tio krome povus plifortigi la strategian aŭtonomion kaj la ŝokreziston de Eŭropo. En mondo kiu estas senĉese pli partigata kaj endanĝerigata pro la superregado de teknikentreprenoj, estas nia respondeco garantii, ke eŭropanoj daŭre sekure kaj fidinde povas fari pagojn je fareblaj tarifoj. Cifera eŭro eble eĉ povus pli akurate garantii privatan protekton ol aktualaj komercaj alternativoj. Por senkonektaj pagoj, nur por la paganto kaj la ricevanto la negocaj datumoj estus alireblaj. Por retaj pagoj reguligite, ke la plej aktualaj privatecfavoraj teknologioj estos uzataj. Ĉiuj datumoj estos pseŭdonimigitaj kaj konservitaj en la EU. Tio signifas, ke ili devas obei la plej severajn normojn pri privateco.

Estas aplikite, ke aŭtonomaj aŭtoritatoj, rajtigitaj pri datumprotektado, kontrolos nian plenumon de la regularo.

La baza uzado de la diĝita eŭro estos senpaga kaj alirebla por ĉiu ajn, ankaŭ por homoj kun limigitaj diĝitaj kaj financaj lertecoj, eĉ por sociaj malavantaĝitoj. Neniu estos ekskludita. Per aplikaĵo ĉiu ricevos inkluzivan kaj alireblan pagilon.

Tamen diĝita eŭro estas celata esti pli ol nur unu el aro da pagiloj. Ĝi ankaŭ reciproke alproksimigos eŭropanojn en vasta mondo, en kiu ciferecigo kreskadas kaj kiu samtempe malstabiliĝas. Tio krome povus plifortigi la strategian aŭtonomion kaj la ŝokreziston de Eŭropo. En mondo, kiu estas senĉese pli partigata kaj endanĝerigata pro la superregado de teknikentreprenoj, estu nia respondeco garantii, ke eŭropanoj daŭre, sekure kaj fidinde povu fari pagojn je fareblaj tarifoj. Ciferecimpulsa eŭro eble eĉ povus pli certe garantii privatan protekton ol aktualaj komercaj alternativoj. Por senkonektaj pagoj, nur por la paganto kaj la ricevanto, la kreskadas kaj kiu samtempe tamen malstabiliĝas. Diĝita eŭro povas ankaŭ plifaciligi nian vivon, tamen ankaŭ konservi nian elektelecon.

Antaŭ unu jaro la Eŭropa Komitato prezentis la tutajon por komuna monunuo, por garantii en la eŭro-regiono kontantajn pagojn kaj krei kadron por ebligi la eldonadon de cifereca eŭro. Ni bonvenigos la kurantan demokratian debaton kaj daŭrigos la kunlaboron kun ĉiuj interesatoj.


Ni devas kapti la impulsmomenton, ĉar la mondo ĉirkaŭ ni ŝanĝiĝadas kaj la mondpolitikaj riskoj kreskas. Kune ni povas prizorgi, ke la eŭro – nia komuna monunuo – estos preta por la diĝita epoko kaj ankaŭ estontece apogos la de la eŭropanoj tiel dorlotatan liberon".

La stabo de la ECB en Frankfurto



Verkis: Piero Cipoliono, direkciaro de ECB
Nederlandlingva versio aperis
en la belga gazeto "De Morgen"
de la 27a de junio 2024

Esperantigis: Bert



La patro de "eŭro" estas esperantisto

Ne multe konata estas la fakto, ke la elpensinto de la vorto "eŭro", la nomo de la ĉefa monunuo de Eŭropa Unio, estas la belga esperantisto Germain Pirlot, instruisto en mezgrada lernejo en Ostendo.



En sia letero de la 4-a de aŭgusto 1995 Pirlot proponis al la Prezidanto de la Eŭropa Komisiono Jacques Santer doni la nomon "euro" (eŭro) al la nova eŭropa mono. En sia letero de la 18-a de septembro 1995 Santer dankis s-ron Pirlot pro tiu sugesto (ref. SG/95/D/86446) kaj la nomo "eŭro" estis oficiale akceptita en la Eŭropa Ĉefkunveno en decembro 1995 en Madrido.

Pirlot dum multaj jaroj kolektis kaj regule publikigis informojn pri simpati-esprimoj de politikistoj pri Esperanto. Li ankaŭ organizis varbadon por Esperanto ĉe anoj de la Eŭropa Parlamento. Inter 1980 kaj 1987 li estis kronikisto pri Esperanto por la belga ĵurnalo *La Dernière Heure* (La Lasta Horo). De 1977 ĝis 1992 Pirlot kolektis kaj publikigis informojn pri oficialaj Esperanto-kursoj ĉe universitatoj. En 2002 li reaktivigis tiun servon. Pirlot estas ano de AIS de ties fondo en 1983. Li fondis premion, kiu subtenas sciencajn verkojn en Esperanto.

La eŭro estis enkondukita la 1-an de januaro 1999 kiel oficiala monunuo de la tiamaj dek unu "eŭro-landoj" (poste 12, ĉar Grekio aldoniĝis en 2000): de tiam ĝis 2002 oni povis pagi en eŭroj nur per bankkarto aŭ bankĉeko. La eŭro fariĝis mantuŝebla nur ekde la 1-a de januaro 2002, kiam aperis la biletoj kaj moneroj.

La eŭro (EUR, €) estas la ĉefa monunuo de Eŭropa Unio: ĝi estas la sola valuto de Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Irlando, Italio, Kipro, Luksemburgo, Malto, Nederlando, Portugalio, Slovakio kaj Slovenio, el kiuj konsistas EMU (Eŭropa Mona Unio). Tiun ĉi lando-grupon oni nomas Eŭrozono, Eŭrogrupo aŭ eĉ Eŭrolando.

La eŭro ankaŭ estas la ĉefa valuto de iuj nacioj kaj nacioj ekster Eŭropa Unio: Andoro, Monako, San-Marino, Vatikano, Montenegro, Kosovo (en Serbio) kaj Akrotirio kaj Dekelio (en la Unuiĝinta Reĝlando).

La eŭro enkalkulas 8 monerojn: de 1, 2, 5, 10, 20 kaj 50 cendoj, 1 kaj 2 eŭroj; kaj 7 biletojn: de 5, 10, 20, 50, 100, 200 kaj 500 eŭroj.

La biletoj havas bildojn pri pontoj kaj pordoj, ĉiuj estas fikciaj, sed laŭ 7 diversaj arkitekturaj stiloj. Ĉiu monero havas 15 diversajn bildojn sur dorsaj flankoj, po unu por ĉiu lando. Ĉiu lando de EMU rajtis elekti desegnojn por la dorsa flanko de la eŭro-moneroj.

La eŭro do havas ion komunan kun Esperanto: la nomon donis al ĝi esperantisto. Tamen estas unu diferenco: dum la eŭro malaperigis la antaŭajn valutojn, Esperanto respektas ĉiujn lingvojn kaj ebligas interkulturajn kontaktojn en plena neŭtraleco kaj demokratio.

GRANDIOZA PANORAMO



La arto labori kune

Okaze de la 70-a datreveno de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj, Humphrey Tonkin, UEA eldonis tiun ĉi panoraman kolekton de artikoloj de 106 aŭtoroj pri lingvopolitikaj, interlingvistikaj, esperantologiaj, historiaj, movadaj, literaturaj kaj strategiaj temoj, kaj rememoroj. Pinta eldona omaĝo al la pinta aganto.

LA ARTO LABORI KUNE. Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA 2010. 901 p. 25cm. ISBN 978 92 9017 113 3. Prezo: €60,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

09.07.2024 15:09

Mia kara Jozefo,

Esperable ankaŭ ĉe vi la suno finfine anoncas la “printempan” someron! Tamen, mi ne volas ĝeni vin, eble hobiumante en via ĝardeno aŭ laborante pri “grava” projekto por Esperantio.

Nu, vi ja scias, ke vivsigno de mi samtempe estas peto kaj alvoko por provlegi la freŝan numeron de “Esperanta Numismatiko”.

Evidente mi denove kaj tutkore antaŭdankas vin pro via nemalhavebla kunlaboro!

Amike kaj numismate via,

Bert

14.07.2024 10:44

Kara Bert,

mi salutas vin el la infere varma Karpat-baseno, kie mi sinforgese baniĝas – en mia ŝvito.

Per WeTransfer mi sendos al vi “nian” novan numeron. Mi ĝojis interalie pri la artikolo pri Rikardo Ŝulco, kun kies prilingvaj opinioj mi pliparte ne povis identiĝi, sed ricevinte por recenzo lian poemkolekton, min trafis agrabla surprizo, kiun mi ankaŭ esprimis en mia recenzo. Reage mi ricevis de li neatendite afablan leteron kun donaceto por mi.

La medalon “Pro Esperanto” de Hungaria Esperanto-Asocio ankaŭ mi elmeritis, sed pro la altaj kostoj mi devis kontentiĝi per la nura papera diplomo. Mi tre bedaŭras ne ricevi tiun belan memorajon.

Kun amikaj salutoj: Jozefo



12.07.2024 16:56

Saluton, kara Maritza!

Unuavice mi petas novan okazon prezenti min. Mi estas Bert Boon el Tienen (Belgio), dume multe malpli juna (76-jaraĝa) ol tiam kiam vi loĝis kelktempe en nia domo dum via vizito en Belgio. Ni perdis kontakton, escepte dum nia vizito en Havano kelkajn jarojn poste, kaj ni ankaŭ iam revidis vian filinon, probable(?) dum la jubilea UK en Lilo(Francio).

Mi supozas, ke vi, same kiel mi, ankoraŭ estas senĉese aktiva en la Movado. Mi mem, antaŭ pli ol dek jaroj iĝis la iniciatinto de tute nova fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” kaj finredaktoro de la revuo “Esperanta Numismatiko”, nun jam realigante la 11an jarkolekton.

Dum multaj jaroj mi vane serĉis la nomon de la kuba (?) medalisto-artisto kiu kreis kaj skizis la reversan flankon (kun bildeto de Zamenhof) de la fama kuba UK-medalo de 1990 en Havano. Antaŭ nelonge mi tamen finfine tute hazarde malkovris lian nomon: ALBERTO GONZALES PEREZTOL!

Bedaŭrinde en la Reto (google) li ŝajnas esti tute nekonata! Do, kara samideanino, mi ne povas ne peti vian helpon por trovi iajn biografiajn kaj prikarierajn elementojn (ĉu kun foteto?) pri li por povi aldoni lin al la jam longa listo de liaj gekolegoj en nia revuo!

Mi ege antaŭdankas vin kaj tutkore salutas vin kaj vian familion!

Amike kaj numismate,

Bert



17.07.2024 23:21

Estimata Sinjoro Wu Guojiang, kara samideano!

Tute hazarde mi trovis en la Reto vian retadreson kaj nur tiel eksciis, ke vi estas fakdelegito de "Ĝemelaj urboj". Poste mi ankaŭ trovis viajn datenojn en la UEA-Jarlibro.

*Mi skribas por peti viajn helpon kaj kunlaboron por la fina kompilado de la **Unua Katalogo de Esperanta Numismatiko** en la historio de Esperantujo, baldaŭ eldonota kaj sendota perrete senpage kaj senkoste al ĉiuj mendontoj.*

Ĝis nun mi trovis nur malmultajn fotojn kaj priskribojn pri esperantaj medaloj iam eldonitaj okaze de "ĝemelaj" eventoj, renkontiĝoj, kongresoj ktp. Kiajn informojn mi precize bezonas por povi plejble komplete priskribi tiajn medalojn, vi trovos en la aldona sendata revuo, en la rubriko "Moneroj & Medaloj".

Mi krome kunsendos fakgrupan varbilon por niaj ĉinaj samideanoj kiuj interesiĝas pri (esperanta) numismatiko. Bonvolu dissendi ĝin, mi petas!

Mi tutkore antaŭdankas vin kaj mi esperas ricevi riĉan rikolton de "ĝemelaj" medaloj, por ke ili ne manku en la unua katalogo.

*Altestime kaj numismate,
Mag. Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*

28.07.2024 13:13

Mag. Fil. Bert Boon,

pro preparadoj por la 5-a Liaoning Recitado de Esperantaj Poemoj, kiu finiĝis en la 26-a de julio 2024 kaj probable estos legebla en la UEA-revuo ESPERANTO, mi ne havis tempon atenti pri mia retadreso. Pardonon.

Tamen bedaŭrinde mi malmulte aŭ nenion scias pri medaloj kaj moneroj kvankam mi estas fakdelegito, eĉ estis komisiito pri la projekto Ĝemelaj Urboj de UEA. Vi povas serĉi en la bulteno Informilo de Ĝemelaj Urboj, kiun mi redaktis, probable vi povas ion akiri.

Amike
Wu Guojiang

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.07.2024 13:46

Saluton Bert,
koran dankon pro la revuo.
Kiel kutime mi metis ĝin en la reto:
Esperanto arĥivo Esperanto Numismatika Asocio (alcl.be)
Elkorajn salutojn
Albert
vikiflandrio.alcl.be

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.07.2024 17:38

Kara amiko,
koran dankon pro la sendo!
Dezirante fruktodonan daŭrigon, ni kore salutas.
Perla Martinelli (Literatura Foiro)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.07.2024 14:19

Dankon pro la revuo!

Kiel kutime mi disvastigos ĝin kun rimarko pri la monumento de juna Zamenhof en Bjalistoko.

Amike,
Maria Niemyjska

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.07.2024 20:43

Kara Bert,

nun la nova numero de via revuo estas rete legebla.

Salutas amike,
Frank Merla
www.frali.net

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.07.2024 21:38

Koran dankon,estimata!

Eva Boyadjieva (medicinistoj-por-esperanto)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

24.07.2024 18:52

Dankon Bert!

El ĉiu numero mi lernas ion novan.

Amike,
Renato Corsetti

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.08.2024 15:01

Kara, Bert,

dankon pro la sendita vica numero de ENA.

Mi deziras kontribui por la revuo per miaj trovaĵoj interesaj por numismatoj.

Amike,
Anatolo Sidorov

05.08.2024 17:57

Kara Anatolo!

multan dankon pro la sendo de interesaj fotoj. Precipe la medaleto de REU estas tre interesa por nia revuo kaj por mia kolekto. Ĉu vi havas foton de la reversa flanko kaj informojn pri diametro, metalo, pezo, eldonkvanto kaj la medalisto? Ĉu mi povas aĉeti ĝin?

Mi kore antaŭdankas!

Amike kaj numismate,

Bert

05.08.2024 18:36

Kara, Bert!

mi ĉerpis informon pri la medaleto el reta gazeto de REU "Ponto". Mi sendas ĝin al vi. Bedaŭrinde mi ne scias adreson de E-klubo "Pacifiko". Tamen mi donas al vi adreson de vic-prezidantino de REU Svetlana Smetanina. Ŝi devas scii kaj havi adresojn de ĉiuj, kiuj sendas siajn informojn por la "Ponto". Kontakta adreso estas: Svetlana Smetanina <svsmetanina@yandex.ru> Bonvolu turni vin tien.

Amike,
Anatolo

08.08.2024 13:54

Estimata Sinjorino, kara samideanino,

*vian retadreson mi ricevis de **Anatolo Sidorov**, membro de ENA. Li informis min pri nova projekto de REU el 2023 pri medaleto kun nova blazono, de kiu (skizo kaj definitiva medalo) li sendis al mi por nia revuo du fotojn de la averŝa flanko.*

Mi do nun petas vian helpon, ĉar ENA jam dum pli ol dek jaroj eldonas revuon kun priskriboj de esperantaj moneroj kaj medaloj, celante baldaŭ kompili la unuan numismatikan KATALOGON en la historio de esperanto.

Por informi vin pri la necesaj aspektoj por priskribi medalon, mi aldone kunsendas al vi la lastan numeron de nia revuo, en kies rubriko "MONEROJ KAJ MEDALOJ" vi trovos ekzemplojn de priskribitaj objektoj.

*Mi havas ankaŭ privatan kolekton kaj deziras samtempe aĉeti minimume **du ekzemplerojn de la REU-medalo**. Ĉu tio eblas?*

Mi antaŭdankas vin pro viaj helpo kaj kunlaboro!

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)(ekde 2014)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko de UEA

17.08.2024 17:01

Kara Anatolo, mi kontaktis Svetlana, sed vane...

Bert

17.08.2024 20:28

Bonan tagon Bert.

mi trovis adresojn de E-klubo "Pacifiko". bonvolu skribi tien.

Amike, Anatolo.

С уважением,

Anatolo

23.08.2024 15:26

Saluton, karaj rusiaj samideanoj!

En letero de Anatolo Sidorov, membro de nia asocio, mi ricevis anoncon pri projekto kun nova medaleto de via klubo eldonota honore al la Rusia Esperanto-Asocio.

*Kiel redaktoro de "Esperanta Numismatiko" mi jam dum pli ol dek jaroj montras kaj priskribas (**vidu la aldono!**) oldajn kaj novajn esperanto-medalojn, monerojn kaj jetonojn. La celo estas kompili kaj baldaŭ eldoni la Unuan Numismatikan Katalogon en la historio de esperanto.*

*Mi do petas vian helpon por povi priskribi la medalon de via nova projekto kaj sendi al mi fotojn de ambaŭ flankoj de la medalo kaj mezurojn. **Mi deziras, se eble, ankaŭ mendi kaj aĉeti du ekzemplerojn por mia persona kolekto. En la rubriko "Moneroj & Medaloj" vi vidos kiajn informojn mi bezonas pri via nova medalo.***

Tutkore mi antaŭdankas vin pro via kunlaboro!

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

08.09.2024 22:19

Kara Bert,

mi skribis al Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" kun propono aĉeti 2 ekz. de la medaleto.

Evidentiĝis ke oni nur proponis variantojn. **La medaleto ne estas produktita reale.**

Ĉi-sube estas respondo de la prezidanto.

Amike, Anatolo.

Estimata Anatolo,

al REU necesas nova emblemo. Nia klubo sendis nur varianton de la emblemo. Ĉu plaĉas aŭ ne plaĉas la varianto de la emblemo al estro de REU, ni ne scias? Verŝajne estas aliaj variantoj de la emblemo pli bonaj.

En la projekto ni argumentis nian varianton, kaj faris fotojn, por ke oni vidu kiel aspektus insignoj, moneroj kaj afiŝoj kun la emblemo. Se varianto de la emblemo ekplaĉos al estraro de REU, nur tiam, verŝajne, oni pridiskutos, kiel produkti la insignojn. Do, al tiu demando bonvolu direkti vin en Moskvon.

Estime,

Gennadij

prezidanto de klubo "Pacifiko": ШлепченкоГеннадий<shtole@yandex.ru>

Vladivostoko

10.09.2024 10:42

Kara Anatolo,

multan dankon pro via peto ĉe "Pacifiko". Nun la afero estas klara, ankaŭ pro la klarigoj de la prezidanto. Eble poste venos daŭrigo de la projekto. Ĉu? En nia revuo la redakcio prilumos la projekton.

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.08.2024 14:54

Kara amiko Stanislavo,

kiel progresas la projekto de Gliwice?

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

18.09.2024 9:28

Kara Bert,

eĉ nun mi sukcesis trafolumi kaj legi kelkajn artikolojn el la somera numero de la ENA-revuo! En la vere interesa intervjuo pri kolektado mi povis rekoni ankaŭ mian emon por ĝi :)

Amike kaj dankeme,

Velimir

18.09.2024 10:57

Kara Velimir,

agrade ricevi kaj legi via komenton. Multan dankon!

Kolekti ja estas aspekto de la homa prahistorio kaj evoluo, kiel nia fascino por flamoj en la centro de homa grupo, ĉu ne?

Ĉu vi mem kolektas esperantaĵojn?

Amike kaj numismate,

Bert

18.09.2024 11:16

Kara Bert,

mi kunsentas kun vi! Tre bela metaforo!

Iasence jes, sed ne kiel fokusa temo. Nuntempe mi interesiĝas pri Lauretanaj Litaniaj kaj iliaj (inter)lingvaj kaj simbolaj aspektoj :)

Amike!

Velimir



12.09.2024 21:36

Karaj samideanoj,

mi hazarde legis, ke D-ro Paul Kempeneers ludis gravan rolon en la historio de via asocio. Laŭdire en Bruselo li en 1926 iĝis prezidanto de la Foyer Intellectuel. Krome li estis prezidanto de la Esperantista Brusela Grupo en 1926-1930, 1932 kaj 1947-1955.

Jen do la kialo de mia helpopeto: dum la Beneluksa Esperanto- Kongreso de 1954 en Liège li ricevis la unuan ekzempleron dela ora medalo de la Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Por povi priskribi kaj montri tiun medalon en la revuo "Esperanta Numismatiko" kaj aldoni ĝin ankaŭ al la baldaŭ aperonta "Unua Katalogo", mi serĉas bildon/foton de tiu medalo kaj eventuale ankaŭ artikolon pri la enmanigo al li de tiu grava premio.

*Krome kaj samtempe antaŭdanke mi kunsendas la pli aktualan numeron de la ENA-revuo por inviti vian asocion **tute senpage** aboni la revuon kiu jam akiris preskaŭ 11 jarkolektojn, nur diĝite. Tiel via grupo iĝis la 26a internacia asocia membro de ENA.*

Mi salutas vin amike kaj numismate,

Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito de UEA pri numismatiko



13.09.2024 14:28

Kara samideanoj,

multan dankon pro viaj informoj pri kursoj ktp. kiujn ni dissendos plejeble vaste al niaj 170 membroj.

Ni havas flanke petonal vi por stimuli la agadon de Esperanto-Numismatika Asocio.

Laŭdire la Kulturdomo pasintecce ne nur kreis juvelojn arĝentitajn(broŝon kaj pendigan broŝon), sed ankaŭ diversajn medalojn kaj insignojn rilate al Esperanto-Kulturdomo en Gressilon. Por helpi kompletigi la Unuan Katalogon de Esperanta Numismatiko, ni do petas vian helpon per sendo de bildoj/fotoj kaj plejeble kompletaj informoj.

Ni deziras sukceson al via programo kaj antaŭdankas pro via kunlaboro avantaĝa al ENA.

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon,

Iniciatinto de ENA (ekde 2013)

13.09.2024 17:30

Kara Bert,

mi agas por Greziljono ekde 20 jaroj.

Mi neniam vidis moneron, medalojn aŭ insignojn kun nomo aŭ bildo de Greziljono.

Mi vidis 1-foje ŝtofan insignon kiun ekz skoltoj kudras sur siajn vestaĵojn, sed tiun iu aĉetis aŭ kunportis.

Mi vidis 1-foje broŝon arĝentaspektan kiu pendas sub kolo de virino, kaj eble mi retrovos tiun broŝon aŭ almenaŭ foton.

Nuntempe ni plu havas kaj vendas malnovajn poŝtkartojn: unu kun aerfoto de Greziljono el tempo eble 1950 kaj alia de la manĝeja kameno.

Eble en la arĥivo en la 2a etaĝo, en iu kartono, estas objektoj, kiun vi serĉas, sed mankas homo por traserĉi tiun arĥivon.

Eble vi mem povus iam veni por mem vidi Greziljonon?

Kore,

Bert Schumann

13.09.2024 20:52

Dankon, kara samnomulo!

Mi nun scias, ke mi ne plu devas esperi trovi numismatikaĵojn en la Kulturdomo. Tamen tre bedaŭrinde por esperanta numismato, ĉu ne?

Eble vi retrovos la broŝon aŭ almenaŭ foton!

Mia aĝo malpermesas al mi viziti la kastelon...

Mi tutkore dankas vin,

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

22.09.2024 14:26

Kara, Bert!

Mi trovis interesan paĝon en "Esperanto". Bonvolu trovi lokon en nia ENA.

Amike, Anatolo Sidorov.

22.09.2024 23:01

Kara Anatolo!

Multan dankon pro la interesa artikolo por la rubriko "el la gazetaro" de la venonta numero!

Amike kaj numismate,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

27.09.2024 10:50

Kara samideano Juan,

en la UEA-jarlibro mi trovis vian retadreson kun specifo de "historio kaj Eo en Kubo", do mi supozas, ke vi povus informi min.

Kiel redaktoro de la unua numismatika esperanta revuo mi ĝis nun vane serĉis informojn pri la artisto-medalisto ALBERTO GONZALES PERETZOL, kiu kreis kaj skizis la esperantan flankon(kun busto de Zamenhof) de memormedalo eldonita okaze de la UK en Havano en 1990.

Mi do, se eble, petas foton de la artisto kaj informojn pri lia artista kariero.

Anticipe mi jam dankas vin pro viaj helpo kaj kunlaboro. Permesu, ke mi aldone sendas ekzempleron, donace al vi, de nia revuo!

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Alberto Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko por Belgio

27.09.2024 11:20

Kara samideano Fernando,

En la UEA-jarlibro mi trovis vian retadreson ,do mi esperas, ke vi povus informi min.

Kiel redaktoro de la unua numismatika esperanta revuo mi ĝis nun vane serĉis informojn pri la artisto-medalisto ALBERTO GONZALES PERETZOL, kiu kreis kaj skizis la esperantan flankon(kun busto de Zamenhof) de memormedalo eldonita okaze de la UK en Havano en 1990.

Mi do, se eble, petas foton de la artisto kaj informojn pri lia artista kariero.

Anticipe mi jam dankas vin pro viaj helpo kaj kunlaboro. Permesu, ke mi aldone sendas ekzempleron, donace al vi, de nia revuo!

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Alberto Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko por Belgio

27.09.2024 16:11

Saluton Bert,

Mi ricevis vian peton, dankon por uzi la Reton kaj la sendon de la materialo. Mi rimarkis ke vi ankaŭ faris kopion al s-ano Juan Ramón. Jes, li estas la ĝusta celpersono por la afero. Li estas la oficiala historiisto de Kuba E-Asocio.

Ĉiel mi ankaŭ skribis al li kun la sama peto. Ni vidos. Mi persone sekvos la esploron. Eble li ankoraŭ vivas aŭ mortis aŭ emigris, tio okazis antaŭ multaj jaroj.

Eventuale mi informos. Se Juan Ramón direkte informas al vi pri la afero, bv sciigu tion al mi, dankon.

Altestime,

Fernando A. Paredes

Ĉefdelegito de UEA por Kubo

07.10.2024 10:56

*Saluton denove kara Fernando,
bedaŭrinde ĝis nun mi ne ricevis iun vivosignon de Juan Ramon. Do kio farende nun?
Korajn salutojn el Belgio!
Amike kaj numismate,
Bert*

09.10.2024 3:39

Resaluton kara Bert. Bonan vesperon (frumatenon por vi).
Kompreneble mi devas nepre respondi al vi kiel Delegito.
Mi kontaktis telefone kun Juan Ramón, nia oficiala historiisto de Kuba E-Asocio.
Antaŭe mi skribis al li retroŝton sed fiaskis pro malaktuala.
Malbona novaĵo: kiel tiu artisto ne estis esperantisto, mi reviziis la tiutempan kongreslibron kaj tie li ne aperis. Jam pasis 34 jaroj, tiu persono povas vivi aŭ jam mortis aŭ elmigris, kiu scias? Li neniam plu aperis.
Juan Ramón diris al mi la samon, li perdiĝis je la nepardonebla tempo.
Mi sendas anoncon aperintan en la kongreslibro.
Jen ĉio, mi deziras al vi novajn sukcesojn en via ŝatfako.
Altestime,
Fernando A. Paredes Elósegui
Ĉefdelegito de UEA por Kubo

09.10.2024 16:18

*Koran saluton Fernando kaj Juan Ramon!
Mi ne nur danku la Delegiton el la belega Granda Isla (kie mi estis dum du semajnoj!), sed ankaŭ la samideanon kiu estas vi. Vi tiel persiste strebis akiri informojn por mi, ke mi ne scias kiel rekompenci... Bonvolu ankaŭ danki en mia nomo nian samideanon Juan Ramon!
Tamen, la prikongresa anonco estas tre utila aldono por la rubriko "El la gazetaro" en nia revuo. Denove dankon!
Por iom rekompenci, mi proponas, ekde nun sendi al la Kuba Esperantista Organizo kaj per iu ajn retadreso en Kubo nian revuon kaj krome mencii la vojon retrovi la jam aperintajn numerojn ekde 2014. Se via organizo konsentus, sendu al mi la mesaĝon "Ni volas aliĝi" kaj ni bonvenigos vin ĉiujn kiel 21an asocian membron de ENA, kiu havas aktuale jam 169 individuajajn membrojn en 45 landoj.
Kun amikaj salutoj!
Samideane kaj numismate,
Bert (Alberto)*

10.10.2024 2:51

Saluton Bert. Mi persone profundigas en la aferon kun veraj numismatikoj kaj ties Asocio. Tio elprenas tempon!
Ĝis baldaŭ,
Fernando
<http://numismatica.in>
Skribu en angla aŭ hispana al ili.

10.10.2024 15:17

Kaj tiam...?

10.10.2024 18:20

Ĉu vi nenion komentarias?

10.10.2024 18:48

Kara Fernando!

Mi bonorde ricevis vian mesaĝon kaj petis helpon en la angla ĉe <http://numismatica.in>. Mi atendas respondon.

Multan dankon,

Bert

10.10.2024 19:53

Klarigo.

Samideano Bert, kvankam en iu letero mi informis al vi ke Juan Ramón nenion sciis pri tiu persono kaj mi komunikis tion al vi iom pesimisme, mi ne rezignis kaj rimarkinte, ke mi estis pene kontaktonta kun kelkaj estraranoj de la Nacia Numimastika Asocio, mi skribis al vi mallongan meŝaĝon pri tio la "9an de oktobro" . Ankaŭ mi donis al vi iliajn kontaktdatumojn.

Sed tamen leginte la anglalingvan leteron senditan de vi al tiu Organizo, vi skribis ke "mi nenion povis fari rilate al tio". Rigardu denove mian letereton de la 9a de oktobro, hieraŭ. Mia esploro ankoraŭ ne estis fermita. Tio kostas al mi tempon kaj retajn MB.

Se vi povas, respondu al mi, mi ne estas feliĉa.

Fernando Paredes

10.10.2024 20:37

Kara Fernando,

Mi tre bedaŭras, ke mia letero al tiu persono ŝajnas kvazaŭ mi dirus ke vi ne povis fari ion. Miaj antaŭaj leteroj klare montras, ke mi tre aprezas viajn senĉesajn penojn. Mi volis nur instigi la personon de la kontaktdatumoj por helpi al NI trovi la informojn. Mi opiniis, ke vi rekomendis al mi la aliajn kontaktojn por helpi kaj progresigi la serĉadon.

Ankaŭ mi nun sentas min malfeliĉa pro la fakto, ke mia "strategio" estis malbone dirita kaj komprenita, pri kio mi klare mem ŝuldas, memkulpiĝas kaj do sincere pardonpetas. Bonvolu relegi miajn leterojn al vi, ne al tiu alia persono! Vi revidos kiom mi dankis vin por ĉio kion vi jam faris!

Mi tutkore dankas vin, kia ajn estus la rezulto de niaj komunaj penoj por servi la legantojn de la ENA-revuo, esperantistoj kaj numismatoj!

Tutkore, amike kaj numismate,

Bert

10.10.2024 22:49

OK, samideano, ne problemo.

Mi kontaktis persone kun kvar membroj de tiu Asocio, eĉ kun ties Prezidanto. Mi aldonas nun al vi la informojn de tiuj funkciuloj pri ALBERTO. Rimarkeblas ke li ade laboris profesie en tiu oficiala posteno ĝis la fino.

Eksteroficiala informo prenita de mi per alia fonto pri la nuntempa statuso de Alberto: li troviĝas nun ĉe la landlimo Meksiko/Usono cele al emigrado.

Tiuj esploroj kaj enketoj kostis al mi multe da tempo, peno kaj elĉerpoj de retaj MB.

Altestestime kaj sub viaj ordonoj,

Fernando Paredes.

11.10.2024 3:55

“Alberto González Peretzol estas diplomita je teknika kaj industria deseĝnadoj. Kiam li havis 34 jarojn li atingis la postenon de numimastika dezajnisto ĉe la Stampdomo, partoprenante samtempe kiel skulptisto, je multnombraj projektoj. En 1997, li ricevis la premion pri la plej bona dezajno, por la Medalo pri la XX-a datreveno de la Kuba Stampdomo. Nuntempe li intencas emigri al Usono.”
(tradukita de Fernando Paredes)

11.10.2024 10:13

Kara Fernando!

Mi estas tre entuziasma pro la sendo de la artikolo(j) kaj via kroma traduko aktuale. Por mi tre malfacila serĉado tiel sukcese plenumas! En la printempa revua numero 2 de la 12a jarkolekto 2025 tutpaĝe aperos artikolo pri Alberto kaj liaj meritoj por Kubo kaj por Esperantujo.

Dume mi cerbumas kiel kompenci viajn diversajn penojn por mi kaj niaj legantoj. Sendube ekde nun mi estos je viaj servo kaj dispono se vi bezonus helpon, kunlaboron aŭ alian servon koncerne nian movadon. Tio ne nur kiel delegito, sed ankaŭ pro dankemo kaj amikeco. Do, neniam hezitu kontakti min, se necese aŭ dezirende!

Mi supozas, ke vi havis iujn kostojn okaze de via esplorado por ENA, kiujn mi volonte repagas. Do diru al mi kiom kaj kiamaniere, ĉu?

Ĉu mi jam menciis ke mi en 2004(?) vizitis vian patrujon okaze de la Tutamerika Kongreso, kune kun mia edzino kaj amika paro? Ni eble vidis unu la alian dum la kongreso...

Tutkore kaj amike,

Bert

PS en nia revuo en la rubriko “Retpoŝto” mi ekde la komenco ankaŭ kolektas por la estonteco neprivatajn leterojn de korespondintoj. Ĉu vi konsentas ke mi aldonos ankaŭ nian korespondadon?

11.10.2024 19:18

Saluton Bert! Dankon por viaj kuraĝigaj vortoj, tre afablaj kaj helpopretaj. Jen mia telefonnumero por daŭrigi la babiladon per WhatsApp aŭ Messenger, ĉar retroŝte iom tedas.

Brakumon,

Fernando (+53 5539 0704)



10.10.2024 19:05

Estimatasamideano, kara kolego-instruisto,

vian retadreson mi trovis en la Jarlibro.

*Kiel redaktoro, en la Reto mi vane serĉis informojn pri la du medalistoj kiuj kreis en Israelo kune la **belegan medalon** (en oro, arĝento kaj bronzo) okaze de la zamenhofa jubileo.*

*Mi do petas, se eble, sendi al mi foton de ambaŭ medalistoj kaj informojn pri iliaj artistaj karieroj. La nomoj: **RUBEN NUTELS kaj AHARON SHEVON.***

Anticipe mi jam dankas vin pro viaj helpo kaj kunlaboro. Permesu, ke mi donaccele sendas al vi la jubilean numeron de nia revuo!

Amike kaj numismate,

Mag.Fil. Alberto Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

11.10.2024 12:57

Saluton, kara kolego!

Vere mi estas instruisto (de fiziko, kemio kaj komputiloj, ankaŭ historio - emerita jam 14 jarojn), malnova esperantisto, sed bedaŭrinde mi tute ne okupiĝas pri numismatiko. Eĉ poŝtmarkojn mi kolektis nur antaŭ 70 jaroj. Mi apenaŭ sciis pri tiu bela medalo, kaj mi entute ne aŭdis ĝis nun tiujn du nomojn de la artistoj.

Sed permesu al mi proponi la ĝustan homon, kiu certe scias pli, ĉar lia interesiĝo estas tre proksima al la temo: poŝtmarkoj, esperantaĵoj - certe israelaj. Mi pensas ke li eĉ prezentis la medalon en iu loka kunveno.

Li estas nia prezidanto, Jehošua Tilleman. Tre preciza homo, kaj scias multajn datenojn. Li ne tro ŝatas la digitalan mondon, vi povos kontakti lin per retroŝto. Lia retadreso estas

jehoshua.tilleman@gmail.com

Pardonu pro la ne-tuja respondo, dankon pro via estimiga pet-turno al mi, kaj pro la jubilea numero de via revuo. Interesa, sci-vekiga por mi.

Kun amika manpremo: Gabi Zeevi

11.10.2024 18:41

Saluton, kara kolegino!

Lasu min unuavice kore danki vin pro via afabla kaj tre utila respondo. Dume mi jam kontaktis vian ĉef-delegiton (prezidanton) kaj mi esperas, ke li konsentos helpi min.

Mi estas lingvisto, ankaŭ emeritulo, kaj mi instruis la germanan kaj la nederlandan en mezlernejo. Ankaŭ fojfoje mi instruis historion, sed la ekzaktaj sciencoj estis mia malforta flanko!

Mi deziras al vi bonegan sanon, prosperon kaj feliĉan novan jaron. Espereble tutmonde 2025 estu jaro de nova paco!

Amike kaj samideane,

Alberto

11.10.2024 20:37

Dankon, kara kolego!

Espereble vi ricevos la deziratajn informojn.

Mia pli forta flanko estas: kiel instrui la ekzatajn sciencojn per humanisma vidpunkto. Oni ne povas instrui Galilei-n kaj Newton-on kaj ne menci la epokon, la agadojn de Leonardo da Vinci kaj Kristoforo Columbus.

Eble mi estas ankoraŭ malnova polihistoro, kies tempo jam pasis?

Unu rimarko: mi estas via kolego, ne kolegino. Gabi estas la karesnomo de Gavrielo (GaBrielo en erara latina lego de la greka transskribo). Ĝi estas sufiĉe uzata en la moderna israela hebrea lingvo. Eĉ unu el la armeaj generaloj nomiĝas Gabi, tre grandkorpa, brutala viro.

Pri la armeo: ni ambaŭ esperas ke en la venonta jaro pli parolos la sobraj mensoj kaj ne la kanonoj.

Ĝis, ĉion bonan por 2025, aŭ 5785 laŭ la hebrea kalendaro!

(Mi entute ne estas religia, male! - sed mi ne povis ne menciĝi kiel interesaĵon. Ja ĉiu kalendaro estas arbitra).

G.Zeevi

14.10.2024 10:18

Saluton kara Gabi!

Mi pardonpetas pro la prokrasto de mia respondo, sed en la semajnfino la familia vizito kaj politikaj balotoj malhelpis trovi libertempon por trankvile respondi.

Mi havas la impreson, ke ni- kiel instruistoj-havis/havas la saman celon: la humanisman nereligian vidpunkton, kiun mi ankaŭ abunde retrovis ĉe Harari en "Sapiens" kaj "Nexus"! Ĉe ni, kie bedaŭrinde dum la lastaj jardekoj kreskadas denove la novfaŝistaj fipensoj kaj la malŝato koncerne rifuĝintojn kaj aliulojn, oni devas denove klare skizi tiun teruran epokon de mallibero sub la faŝistaj botoj al la aktualaj gejunuloj... kaj tion mi faris arde.

Dankon ankaŭ pro via tre interesa klarigo pri la deveno kaj signifo de via nomo. Jes, ankaŭ en nia kulturo estas sufiĉe ofte la sama antaŭnomo por ambaŭ seksoj.

Mi esperas, ke via familio kaj vi daŭrigos farti bone, malgraŭ la terura milito!

Amike kaj numismate,

Bert



11.10.2024 18:27

Estimata Sinjoro Prezidanto, sinjoro Jehoŝua Tilleman

Mi pardonpetas, ke mi tiel senceremonie eniras vian vivon, sed kara Sinjoro Zeevi rekomendas vin tiel entuziasme, ke mi kolektis mian kuraĝon por peti al vi legi mian helpopeton tute sube.

Mi unuavice alvokis la sinjoron, ĉar ni ambaŭ estas eksinstruistoj... do, karaj kolegoj...

Esperante, ke vi konsentos kaj povos helpi min kaj la legantojn de nia asocia revuo, mi, antaŭdankante vin, aldonas ekzempleron de "Esperanta Numismatiko".

Samideane kaj numismate,

Bert Boon

Belgio



A N O N C O J

&

E V E N T O J

Germana premio por kara amikino Sofio en Herzberg!

Germana Esperanto-Centro (EGS), Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo, Germanio



Denove granda kaj grava paŝo por Esperanto antaŭen!

Solena transdono de la Federacia Meritkruco sur Bendo okazis por Zsófia Kóródy far distriktestro s-ro Marcel Riethig el Göttingen

Karaj!

Zsofia Korody ricevis pro pli ol dudekjara multflanka elstara laborado por resp. per la neŭtrala paclingo Esperanto en Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo la renomman premion de la Federacia Prezidento s-ro Steinmeier. Tio estas grava paŝo antaŭen por la socia, politika kaj administracia agnosko de Esperanto.

Dum la lastaj jaroj nia ŝtato draste reduktis la disdonkvanton de tiu elstara ordeno, nome nur por personoj kun eksterordinaraj longjaraj sukcesaj - unuavice komunitilaj laboradoj.

La festo okazis la 19an de junio 2024 en la kunsidosalono de la urbodomo de Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo.

La ĉefo de nia distrikto Göttingen laŭtlegis la laŭdacion. Sinjoro Riethig aparte menciis la interkulturajn sukcesojn rilate al Esperanto en nia urbo kaj regiono.

Urbestro Christopher Wagner, ĉeestantaj politikistoj kaj Esperanto-geamikoj elkore gratulis al Zsofia Korody kaj dankis pro la multjara konstanta laborado, por la aktiva engaĝiĝo por la neŭtrala paclingvo Esperanto kaj por Herzberg – la Esperanto-urbo.

Intertempe Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo kun la aktiva Esperanto-Centro atingis grandajn sukcesojn. Tie ekestis unu el la plej grandaj Esperanto-kolektaĵoj kun larĝskalaj Esperanto-fakarkivoj, okazas en la muzeo de la Welf-kastelo konstantaj Esperanto-ekspozicioj kaj troviĝas ampleksa Esperanto-sekcio ankaŭ en la urba biblioteko. La Esperanto-Centro en Herzberg laboradas kiel multkompetenta Esperanto-instituto, ekzemple por kulturo, klerigado kaj informado. Regule ni flegas kontaktojn kun politikistoj, la urba administracio kaj lokaj asocioj.

Zsofia Korody estis kortuŝita kaj dankis al ĉiuj kunstrebantoj, subtenantoj, geamikoj kaj volonte daŭrigos la Esperanto-laborojn.

Ni invitas vin ĉiujn okaze de la 18-a naskiĝtago de Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo al la Esperanto-ĝardenfesto (12.07.2024, 14 h).

Bonvenon, kunfestu!

Kun amikaj kaj samideanaj salutoj,

Peter Zilvar Harald Mantz

Aldonoj:

- 1) Foto ĉe la solena festo*
- 2) 2) Albumo pri la memorinda evento: <https://photos.app.goo.gl/hmEquAnkJRbFtjuQ6>*

La plej grandaj oraj moneroj en Rusio



Monera korto en Sankt-Peterburgo

La plej grandaj oraj moneroj en Rusio havas nominalvaloron je 50 000 rubloj. Estas du:

- la unua estas: **“La 150-jariĝo de Banko de Rusio”**, produktita en la 2010, eldonkvanto estas 50 ekz., diko 23 mm, diametro 130 mm;
- la dua estas: **“La 175-jariĝo de ŝpara afero en Rusio”**, produktita en 2016, eldonkvanto estas 15 ekz.



Travidebla monerujo



ora 5 kg- monero

Ambaŭ moneroj estas produktitaj el oro je 999%. Maso estas 5 kilogramojn! Ĝenerala maso estas 5035 gramojn.

Kiom kostas la moneroj? Por kompari, ni prezentas oran moneron “Sciuro ordinara” de unu kilogramo, nominalvaloro 10 000 rublojn, ora, produktita en 2023, diko 8,5 mm, ĝenerala pezo 1004,4 g. Hodiaŭ ĝi kostas 7 800 000 rublojn.

Do, monero kun pezo de 5 kg kostas ne malpli ol 39 milionojn da rubloj. Almenaŭ unu 5-kg-a monero estas deponita en Sankt-Peterburga “Monera Korto”. La moneroj estas konservataj en apartaj vitroplastaj travideblaj ŝrankoj kun kvar aperturoj. Oni povas preni la moneron, sed la diametro de la aperturo ne permesas elpreni ĝin el la ŝranko. Oni povas nur palpi, foti, pezi la moneron en la vitroplasta monerujo, sed ne povas elŝrankigi ĝin.

Pri la sorto de aliaj ekzempleroj ne estas informo...

“Milionrubla ĉielskrapanto”

En la sama “Monera Korto” estas eksponata monera piramido. Ĝi estas konstruita per miliono da rubloj intergluitaj. La konstruo havas tri metrojn da alteco kaj pezas 3,5 tunojn.



milionrubla piramido



50 000 rubloj

Kompilis Anatolo Sidorov (aŭguston 2024, Sankt-Peterburgo) ENA tutkore dankas Anatolon pro lia nova kontribuado!

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudentaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis **170** individuaj membroj kaj **25** esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be